# LA PACDEFENDANTO

N-o. 42 NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Junio 1955.

---

## ĜOJIGAN REVIDON EN OTROKOVICE!

La ĉefaj preparoj por nia I-a TUTŜTATA KONFERENCO DE ESPERANTISTAJ PACDEFENDANTOJ estats faritaj. Dum preskaŭ duona jaro nia propagando atingis milojn da esperantistoj en Ĉeĥoslovakio kaj eksterlando. Kiam vi ĉi tiun n-on ricevos vi povas kalkuli, ke jam certe centoj aliĝis por unuafoje post longa intervalo denove ĝui kelkajn agrablajn tagojn en la rondo de nia verda, porpaca internacia familio. Ĝi fariĝos fakte internacia, ĉar jam dekoj da gekamaradoj el Francio, Svedio, Polio, Norvegio, Aŭstrio, Hungario, Anglo, Bulgario kaj Sovjet-Unio serioze promesas partopreni, dume pluaj multnombraj gek-doj ankoraŭ persiste klopodas ricevi la necesan enirpermeson. Kun forte batantaj koroj kaj streĉita spiro niaj gekamaradoj el kapitalist. landoj atendas la momenton kiam ili unuafoje en sia vivo transpaŝos nian landlimon por rigardi la tute alian vivon en popoldemokrata lando. La ĝojo estos neimageble granda, kiam ĉeĥoslovaka kamarado povos ĉirkaŭbraki kamaradon el Anglio aŭ Svedio, kaj sian alternativon ĝi atingos, se efektive sukcesos ĉeesti la sekratario de la Lingvoscienca Instituto, k-do. E.A.Bokarev el Moskvo. La ĉeesto de tiu k-do. povas alporti gravan ŝanĝon de nia ĝisnuna situacio kaj ĝojigan estonton por nia movado.

Per tiu ĉi amasa renkontiĝo, kiam ni, vidavide, persone povas diskuti kaj priparoli niajn problemojn en ĝojiga kaj vere amika atmosfero, nia ĝis nun bonege proesperanta movado ricevos ankoraŭ novajn impulsojn kaj eĉ ĉiu unuopulo ree ekkuraĝiĝos al ankoraŭ pli granda aktiveco kaj persisto kiu necesas por atingi la de ni sopiratan celon.

Renkonten irante al nia TUTŜTATA de kiu nin distancas jam apenaŭ unu monato, mi estas konvinkitaj, ke ĉiu partoprenanto en ĝi trovos sian lokon. La programo estos abunda kaj absolute grave diferenciĝos de ĉiuj ĝis nun okazintaj amaskunvenoj de esp-istoj en ČSR. Krom la altinteresaj raportoj dum la ĉefaj konferenckunvenoj, nombraj fak-kunsidoj kaj riĉa amuza-kultura programo certe kontribuos al ĉies plena kontentiĝos. Ankaŭ la antaŭiranta SPARTAKIADO, al kiu ni kore invitas ĉiujn eksterlandaj gek-dojn, prezentiĝos al tiuj kvazaŭ miraklo el kiu klare respeguligos nia plifeliĉa vivo sen kapitalist.ekspluatantoj.

Estas ankoraŭ kelkaj gek-doj, kiuj hezitus decidi elspezon da mono por 4-5taga restado en Otrokovice. Tiujn ni volas antaŭverti, ke ili post la TUTŜTATA certe bedaŭros sian ŝparemon. Nia ja ne anoncis la okaziĝon de tiu ĝojiga renkontiĝo antaŭ nur kelkaj semajnoj aŭ tagoj, kaj dum tiuj monatoj, ek de kiuj ni propagandas ĝin, certe ĉiu havis la eblecon kolekti la necesan monon. Kiu tion ne faris, estas mem kulpa. Finfine ja ĉiu kutimas dum belaj someraj tagoj ĝui ie sian pagitan libertempon, kaj vivi hejme ja ankaŭ kostas monon. Ni do kredu, ke ankaŭ la lastaj hezitemuloj fine decidos ĝui sian libertempon en la Verda Rondo de Otrokovice la 7-11.de julio 1955.

Ĝis ĝojiga revido!

R.BURDA

## MILITINKLINO

- Joĉjo, Joĉjo, alvenu rapide, se vi volas vidi la soldatojn! – La patrino vokis en la koridoron.
- Soldatoj, panjo mia, soldatoj.. mi tuj venos. Vivu la soldatoj! Oni malakorde ekkrias.

Kaj fiere rajdante bastnĉevalon, la kapon ĝis orele en kapon, kaj senglavingan lignoglavon terurege balancatan en la aero, kvinjara diableto aperis kaj svingsaltis al la fenestro de la salono apud sian patrinon.

Kiel aŭtomatoj la militistoj la mortitilojn kuŝitajn sur maldekstra ŝultro, laŭtakte preter-pasis la

fenestrojn, tutvestitaj de ridantaj koloraj kun gajaj junaj vizaĵoj.

Kia mirindaĵo ! …

La entusiasmo en la okuloj de Joĉjo antaŭ la preterpasanta regimento.

Joĉjo bedaŭris iomete la soldatojn, kompreneble, sen orumitaj galonoj, kompatindaj malspirituloj…, sed la oficiroj, tiel riĉaj kun tiel brilaj orumaĵoj…..

Joĉjo sin vidis jam en ruĝa kaj orumita uniformo, serioza, fiera inter siaj subuloj, komandate ilin per laŭta, tondra voĉo, per eĉ ordona voĉego….

- La muzikantoj iom post iom silentiĝis kaj ankoraŭ la koro de Joĉjo forte batadis, liaj revemaj okuloj estis fiksitaj je la stratangulo, kie la regimento malaperis.

Li pensas kaj lia bastono tre miras pro la ripozo de sia rajdanto.

– Joĉjo, Joĉjo, ne pensu plu, filo mia. Venu tien ĉi, sur miajn genuojn! Nun vi konfesu al panjo, kion vi pensis en tiu ĉi momento!

– Mi volas firiĝi oficiro…

– Sed vi igos tia, jes – mi konsentas kun paĉjo ankaŭ. Tio estas nia plej granda deziro. Mia filo-kortuŝe lin flustras la patrino: „Kiel vi estos ĉarma, eleganta, en viaj militaj vestoj…..

\+ + + +

Joĉjo kreskis.

Geamikoj kaj geparencoj ĉiam al li donacis militajn ludilojn, por kiuj li entusiasme dankis, uzis kaj admiris.

La gepatroj por li aĉetis ĉiu-semajne librojn pri militaj aferoj kaj pravaj ekzemploj, kiujn li legis avide.

En la liceo li ĉiam preferis la militludojn, kaj reveninte hejmen, la gepatrojn li entusiasmigis per siaj ardaj raportoj pri „venkoj gajnitaj“ kontraŭ kunlernantoj.

La korpo kreskis kune kun liaj ideoj kaj Johano igis forta, fiera oficiro, revanta ĉiam glorajn batalojn kaj militajn heroaĵojn.

Li ne longe atendis.

Milito esplodis en Eŭropo kaj la leŭtanto Johano baldaŭ devis iri al la batalfronto.

Dumpace la patrino kontente ridis kaj petole kaj fiere rigardis la belan aspekton de la filo milite vestitan. Hodiaŭ, kiam ŝi komprenas, ke militulo estas militisto kaj inter la unuaj li devos oferi sian vivon al la patrio, ŝi ploras amare kaj eĉ donus sian vivon por vidi sian filon ne foriranta.

Tamen, post kvar tagoj, la filo envangeniĝis kaj ŝi murmuris por si, dum la radbruo de la malprosimiĝanta vagonaro pli kaj pli mallaŭtiĝis:

- Joĉjo, Joĉjo, se mi vin perdos, ni, la gepatroj ne povos sin pardoni, ĉar sendube ni estas la instigintoj de via morto….

\+ + + +

Post kontraŭatako feliĉa por la malamiko, la korpo de Johano falis mortvundita en sekan drenkanaleton.

Oni ne rimarkis lin kaj li kuŝas dorse regardante la ĉielon.

Lia vizaĝo montras neniam suferon, ĉar la Morto lin prenis tre rapide la koron.

Liaj okuloj estas malfermataj, kvazaŭ vidantaj la vivon, kaj malgrandeta nerva kuntiro lin deviĝas rideti al la mortigonta mitralo, kiu parabolas super li.

De du tagoj li kuŝas tie kaj li ankoraŭ ridetas. Eĉ oni diras, ke li ridas pli volonte, pli forte, eble pro la ekŝvelo kaj ekputriĝo de la korpo, kiuj la ridignervojn kuntiras.

La mitralo ne povas jam lin malbonigi, sed la korvoj, kiuj manĝemaj lin rigardas flanke, preskaŭ kuraĝas iri antaŭen satigi siajn apetitajn dezirojn.

Ili, la karbkoloraj bestetoj, interkonsentas ke la okuloj, precipe la okuloj, estas tre delikata manĝaĵo, sed eĉ morbinta …. Tiu homo estas timinda…

Ne, la nigruloj ne kuraĝas…

Kaj la kadravo ridegas ….

Feliĉo kaj malfeliĉo marŝas brakbrake en kurioza relativiteco.
Sama kaŭzo ridigas kaj plorigas samspeculojn kiuj kredas posedi plej senteman koron.
Ho, ve, ĉiuj pensas kaj sentas laŭ sia mio, kiu ne estas ĉiam laŭdinda, se ni konsideras la homan kaj kunfratigan vidpunktojn.
Ŝajnas, ke la ĝojo kantas laŭte por ne aŭdi la ĝemojn de la suferantoj.
Neniam ni volas pligradigi nian suferon aŭ sengajigi nian gajecon.
Tre granda festeno okazas en la familio Azevedo je honoro de Paŭlo, la nova leŭtenanto.
Johano, morte falinta, promociigis Paŭlon…..-

Saldanha CARREIRA
Portugalio

POR LA VIVO, POR LA PACO !

La volon de nia popolo, defendi la pacon, ĝi konfirmas per siaj subskriboj sub la rezolucio de la Mondpackonsilantaro.
Kune kun la tuta mondo nia popolo firme levas sian voĉon kontraŭ mortsemantoj kaj postulas la tujan neniigon de atomarmiloj, ĉesigon de ilia produktado kaj sekurecon de daŭra paco de la mondo.
En ĉiuj anguloj de nia patrio nia popolo deziras pacon kaj ĝiaj pensoj estas pacemaj, samaj kiel tiuj de ĉiu honesta homo en la mondo. PACON ! Ĝi estas la arda deziro, kiu animas la kamparanojn de Kalabrio, laboristojn de la mondaj havenoj kaj ĉiujn homojn, soifantaj trankvilon en Francio, Germanio kaj Usono, ankaŭ laboristojn, kiuj laboras en sudamerikaj plantejoj. Ĉiujn ligas la sama amo por vivo kaj libereco, preteco defendi la pacon, kiun minacas amerikaj atomfrenezuloj.
Al ni estas kara la patrio, al ni plaĉas la vivo, kiun ni celas plibeligi. La laboruloj en nia lando animataj de la konstrua laboro, klopodantaj konstrui vivon pli riĉan, defendas pacon kaj kontribuas al la batalo kontraŭ la atommilito.
Nia lando suferis tre multe fare de germanaj militistoj dum la lastaj du mondmilitoj. Ĝi ne plu emas suferi, ĝi volas vivi en paco kun ĉiuj popoloj, por povi en paca atmosfero konstrui sian socialismon.
Ni nenium atakis, sed, se ni estos atakitaj, ni scios defendi nin kontraŭ kiuajn.
Ni agadas tage kaj nokte en la minejoj, kamparoj, fabrikoj kaj oficejoj, por la V I V O, por la P A C O.

NITA VRÁNCEANU
MEDIAS – Rumanio

N O V A Ĵ O J E L P O L I O

Post decidoj de la Komitato por la Jubilea jaro de Adamo Mickiewicz, kiun prezidas la prezidanto de la pola Respubliko estas, reeldonata granda verko el pola literaturo „Sinjoro Tadeo“ modela traduko de Ant.Grabowski. Ĝi havos belajn ilustraĵon kaj tamen estos malmulte kosta. Samtempe eldoniĝos verko de poeto Mieczyslaw Jastrun pri Mickiewicz kaj ankaŭ la fama verko de Boleslaw Prus „Faraono“ majstra tradukita de d-ro. Kabe. Mendojn sendu al: Asocio de esperantistoj, Marszalkowska 81/32, WARSZAWA.
La pollingva revuo por popola scienco „PROBLEMY“ publikis sur titola paĝo inter alilingvaj tradukoj de la Mickiewicz- verko ankaŭ fotokopion de esperanta eldono „Sinjoro Tadeo“.
Tre valoras alveno de multaj leteroj kun informpetoj al la komitato de la Junular-Festivalo en Varsovio. Sed multe pli grava estas efektiva partopreno. Do junaj gekamaradoj, klopodu serioze atingi Varsovion!
La 6.de aŭgusto je 9.horo okazos en la Ĵurnalista Domo, strato Foksal (urbocentro) kunveno de esp. partoprenantoj de la Festivalo . La kunvenon prezidos k-do. Bertil ENGLUND el Svedio. Jen la programo: Saluto de la kunvena prezidanto de reprezentanto de la pola Esp-Asocio, de la polaj kaj eksterlandaj Junular-delegitoj, mallonga prelego „Esperanto kiel interkomprenilo de la tutmonda junularo kaj faktoro de la pacbatalo“, koncerto, aranĝota de niaj membroj, eventuale de eksterlanda junularo, amika kunestado kaj fine la Esperanto-himno. Post la kunveno kolektiva vizito de la

tombo de Zamenhof. Nun estas ankoraŭ ĉefa afero , ke kiel eble plejmulte da eksterlandaj gek-doj alvenu, por ke li ne rikoltu fiaskon. Klopodu ankoraŭ rapide instrui Esp-on al tiuj junuloj, neesperantistoj, kiuj jam estas oficiale de Junular-Ligoj delegitaj al Varsovio.

## MALGRAŬ ĈIO NI VENKOS

Kvankam mia agado por Esperanto bone estas konata, la Germana Packonsilantaro invitis min partopreni la Germanan Kongreson por Sekureco kaj Paco, kiu okazis en Dresden la 22-24. de aprilo.

La duan tagon la kongresanoj kunvenis en kvar fakgrupoj en apartaj salonegoj. Mi partoprenis tiun pri „Paca movado kaj lernejo. En la kongresejo mi aranĝis ekspozicion de materialo el la japana pacmovado, i.a. mi prezentis multaj infandesegnaĵojn. La ekspozicio - la sola en la tuta kongreso – estis tre atentita. La prezidantino en fina parolado speciale laŭde menciis pri ĝi. Kiel jam antaŭe interkonsentite, mi parolis kiel unua diskutanto por doni al la diskutado direkton, nome, paroli pri praktika laboro. Mia temo estis: „La rolo de internacia rilato de nia lerneja packonsilantaro". Kromaj demandoj dum paŭzoj fare de pluraj delegitoj atestis, ke tiu temo interesis multajn.

Ankaŭ mi iom konversaciis kun la vidvino de Ives FARGE. Ŝia interpretisto konatigis min al ŝi i.a. kun la komento, ke mi atingas niajn sukcesojn pere de Esperanto kaj s-rino Farge tuj proklamis: „Jes, se Esperanto estus pli aplikata, tio estus bona por nia movado!"

Memkompreneble, en aliaj paŭzoj mi povis en kamaradeca konversacio kun eminentaj partoprenantoj akiri pliajn simpatiojn por nia laboro.

Fine, la trian tagon oni min elektis membro de Germana Packonsilantaro.

Mi nun bezonas infendesegnaĵojn por kompletigi nian kolekton de infanoj el diversaj landoj por povi kompili ilin al granda internacia ekspozicio. Mi povas interŝanĝe sendi gernamajn infandesegnaĵojn. Krome mi ĉiam bezonas adresojn de korespondemaj infanoj el ĉiuj landoj.

Nia lernejo aranĝas tendaron en Saksa Svisio, en Hinterhermsdorf. Mi mem partoprenos ĝin la de julio ĝis 6an de aŭgusto. Facile ni povus renkontiĝi ĉe la landlimo, kiun formas la rivereto Kirnič ĉu ni tie povus renkonti kun viaj junaj pioniroj el ČSR?

Kiu povas sendi salutleterojn okaze de la Internacia Infantago kaj al kiu ni povus tiajn sendi?

Ludwig SCHÖDL
Rosa-Luxemburg-Str.37, NEURUPPIN, (2) Germanio-DDR

## SALUTO DE HUNGARAJ PACAMIKOJ

Okaze de printempta renkontiĝo de diverslokaj esp-istaj pacamikoj en Budapest la 2. de majo 1955 tiuj sendas al la ĉeĥosl. pacdefendantoj siajn elkorajn salutojn. Inter la subskribintoj de la salutletero troviĝas ankaŭ la nomo de konata hungara esp. pacbatalanto, k-do. Julio BAGHY kun jena alskribo:

„Mi tre volonte sekvus vian modelan ekzemplon, sed por agi ne sufiĉas celkonscio, se mankas la ebleco."

Kara kamarado Baghy, ankaŭ al ĉeĥoslov. k-doj mankis ĉiu-ajn ebleco, kiam ilia Centro en Praha mem likvidiĝis. Kaj ĵus celkonscio de niaj fidelaj gesamideanoj kaj ilia persisteco helpis krei en la plej malespera situacio eblecon al plua laboro en nia lando. Kvankam sen oficiala permeso , ni sukcesis enpenetri kulturajn kaj uzinajn klubojn kaj per pozitiva laboro, ĉefe por la paco, ni sukcesis konvinkigi ties funkciulojn pri la praveco de nia afero. Por defendi per Esp-o la mondpaco, tute ne pravas havi oficialan aprobon aŭ ne.

R.BURDA

# L E T E R O  A L  L A  P O P O L Ĉ A M B R O  D E  D.D.R.

K-doj deputitoj !
En la nomo de la Sveda Sekcio de la MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO ni apelacias al vi pri jena grava afero, kiu tuŝas la internacian pacmovadon:

Jam en la j. 1953 kunvenis en Sankt Pölten, Aŭstrio, progresemaj esperantistoj el diversaj landoj kaj fondis internacian porpacan Esperanto-organizon, kiu sin dediĉas al porpaca batalo en la senco de la Monda Packonsilantaro. Por tiu celo ni eldonis Manifeston kaj eldonas gazeton „PACO".

Tiu decido plene respondas je la decidoj kaj alvokoj de la Monda Packonsilantaro, nome, ke necesas krei pacajn kaj amikajn rilatojn inter ĉiuj popoloj. La Packonsilataro en siaj leteroj ankaŭ montris sian komprenon pri la utileco de nia movado. La spertoj de nia ĝisnuna agado montras, ke per Esperanto eblas doni grandegan kontribuon al tiu porpaca laboro. En la mondo ekzistas milionoj da homoj, kiuj scias Esperanton. Inter ili ni volas labori kaj veki ilin al aktiva partopreno en la porpaca lukto. Pro tio ni elektis la devizon por nia movado: „PER ESPERANTO POR LA MONDPACO!" Ni konsideras Esperanton kiel tra gravan ilon en la porpaca batalo, kiun necesas eluzi por tiu celo.

Kun ĝojo ni ankaŭ spertis kiel nia movado kreskas en multaj landoj, ankaŭ en socialistaj landoj ni trovis eĥon por ĝi kaj senĝene ni sendas nian gazeton al ili. Kelkaj mem laŭvice ĝin eldonas. Nur al Via Demokrata Respubliko ni ankoraŭ ne sukcesis sendi nian pacgazeton sen, ke ĝi estus konfiskita. Ŝajnas al ni paradoksa, kiam porpaca gazeto estas konfiskata en porpaca lando, kiel nun okazis, kaj ni konsideras tian sintenon kiel malnormalan kaj indignan, kiu povas esti konsekvenco nur de tio, ke Vi ne estas sufiĉe informitaj pri nia movado kaj ties celoj. Ni volas montri al Vi unu ekzemplon por pruvi la paradoksan sintenon kontraŭ nia gazeto:

La aŭgusta n-o. 1954, kiun ni eldonis en Svedio kaj de kiu ni sendis 50 ekz-ojn kiel provojn al esp-istaj pacdefendantoj en Via Respubliko, tiuj gazetoj estis konfiskitaj laŭ sciigo, sendita al la adresato. Kia enhavo estis en tiu ĉi n-o.? Jena: Informa artikolo pri la kreskanta movado en Svedio kontraŭ la usonaj atompronoj aŭ eksperimentoj, porpaca artikolo de d-rino Andrea Andrén (fama sveda Stalin-Pacpremiinto) speciale skribita por „PACO", raporto pri packunveno de eminentaj reprezentantoj el 30 landoj, kiuj konferencis en Stockholmo, deklaro de hungara membro de la Mondpackonsilantaro, artikolo pri danlanda packonferenco kaj artikolo de usona pacdefendanto pri la rolo de la fia Wall Streat politiko. Ni kunsendas al Vi ekz-on de tiu gazeto kune kun ekz-o. de nia Manifesto.

Ni ĝojus, se Via registaro volus helpi al nia movado, tiel ke ni ricevus eblecon sendi nian organon al esp-istoj en Via Demokrata Respubliko, kaj ke la esperantistaj pacdefendantoj en DDR ricevu la permeson, libere labori por „MEM", eldoni certajn ekz-ojn de nia organo „PACO", eble plejbone kiel sekcio de la DDR-Packonsilantaro. Ni bone scias, ke kelkaj homoj kiuj scias Esperanton, provis uzi la lingvon, same kiel ili uzas aliajn lingvojn, por siaj kosmopolitaj celoj kaj ekzistas eĉ fanatikuloj, kiuj pledas anstataŭigi la naciajn lingvojn per Esperanto. Estus ja domago por la internacia lingvo, se oni kondamnus ĝin pro agoj de homoj kiuj misuzas ĝin, precipe kiam tiuj misuzas ankaŭ naciajn lingvojn por siaj frenezaj, ni diru krimaj ideoj.

Lingvo, ĉu esperanta, germana, angla, rusa aŭ sveda ne povas esti ideologio sed nur ilo por interkompreniĝo de homoj. Hodiaŭ, kiam necesas krei interkompreniĝon kaj amikecon trans la landlimo por la paco, ni konsideras Esperanton kiel plej taŭgan ilon por tiuj kontaktoj kaj anstataŭ la lingvo detruu la naciajn kulturojn, ĝi povas nur pli riĉigi kaj fortigi ilin, same kiel oni per Esperanto facile kreas porpacajn kontaktojn inter ĉiuj popoloj de la mondo. Esperante, ke vi serioze pritraktos niajn petojn, ni elkore salutas Vin, dezirante daŭran sukceson al via konstruado de socialismo, batalo por unuigita kaj demokrata Germanio kaj Mondpaco. Kun porpacaj salutoj

Sveda sekcio de „MEM", peranto Karl KVIST-DEJE.

STANDARDON POR LA ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-JUNULARO

La pola Esp-Junularo el urbo Glucholazy decidis donaci al la ĉehoslovaka Esp-Junularo, kiu ĉe-estos la Festivalon de Junularo kaj Studentoj en Varsovio, bele teksitan standardon kun esperanta kaj naciligvaj testoj. Tio signifas, ke nia junularo devas nepre klopodi por amasa partopreno, se ĝi ne volas perdi la okazno ricevi ĉi standardon.

A t e n t i g o !

Ĉeĥoslov. Esperantistoj ricevis multobligitan prospekton pri nov-eldonita, fuŝita Esperanto, kiun la aŭtoro nomas „Esperantština". Temas pri elpensaĵo de pastro J. Železný el Těchonice, pošta Nalžovské Hory (se vi volas kontakti kun li) kiun studie ordigis dipl. d-ro. de scienco politika, J. Tichý el Instituto „GLOBUS" en Praha. K-do. pastro Železný estas ankaŭ nia abonanto, kaj ni rekomendas al li, ke li prefere sin okupu anstataŭ per „Esperantido" kaj „Esperantština", per aktiva partopreno en la esperantista pacbatalo, kie li certe trovos pli da simpatiuloj, kiuj ne ĵetos liajn verkojn en paperkorbon. La dipl.sc.pol.d-ro J. Tichý verŝajne ne povas trovi oportunan okupon, pro tio ni konsilas al li, ke li provu fari same.

R. Burda

RADIO ZAGREB PAROLAS …

Mi aŭskultis la Esp-elsendon de d-ro.Ivo Boroveĉki, kiu laŭtlegis alvokon pri la Junular-Festivalo en Varsovio kaj raportis, ke la Festivalkomitato dungis jam Esp-interpretiston kaj sugestis la aŭskultantojn korespondi kun la komitato pri partopreno. D-ro.Boroveĉki ankaŭ anoncis krom la fama verko de Mizskiewicz, „Sinjoro Tadeo" espereblan eldono de pluaj polaj verkoj en Esperanto kaj akcentis, ke multaj mendoj povas signifi novan epokon por la Esp-movado kaj Polio eĉ Sovjet-Unio kaj ceteraj Popoldemokratioj.

Bertil ENGLUND

LETERO, POR ĈIUJ INTERESA :

Al la Bulgara Esp-Asocio
Karaj kamaradoj!

Koran dankon por via tre afabla letero kaj gravaj por mi sendaĵoj. Ili tre helpas al mia propagando de Esp-o en mia lando. Eble baldaŭ oni povas atendi revigliĝon de Esp-movado en Sovjet-Unio. Se ekestos novaĵoj, mi nepre raportos al vi.

Kompreneble, inter sovjetaj lingvistoj, kiel ankaŭ en aliaj landoj, estas kontraŭuloj de Esperanto; sed samtempe inter ili estas ankaŭ ĝiaj varmaj amikoj.

ESPERANTO HAVOS SUKCESON, SE NI POVAS MONTRI, KE ĜI ESTAS GRAVA RIMEDO DE NIA LABORO POR PACO, DEMOKRATIO KAJ SOCIALISMO !

Vian katalogon mi uzos ankaŭ estonte. Mi jam mendis por la Scienca Akademio du vortarojn (de Nikolov kaj Grigorov). Ĉu mi povas al vi sendi iajn ruslingvajn eldonaĵojn? Kiujn, nomo?

Mi vidis mian leteron al vi en LA PACDEFENDANTO, kiun sendis al mi k-do.Burda. Dank` al tio mi nun ricevas ĉiu tage Esp-leterojn. Via iniciato tre helpas al mi, kvankam ĝi kaŭzis ankaŭ kelkajn malagrablajn liniojn de k-do.Burda, pri via Esperanto-laboro. Sed tio rilatas ne nur al vi, ankaŭ al mi kaj miaj kamaradoj en Sovjet-Unio.

Mi deziras al vi bonajn sukcesojn kaj frate vin manprenas.

E.Bokarev – Moskvo
Institur Jazikoznanija, Volhonka
Str.18/2,MOSKVO G.19,Sovjetunio.

RAPORTO EL BULGARIO

Jam estas preskaŭ certe, ke nia delegito veturos al Helsinki por Packongreso. Finfine jam troviĝas en multobligejo la unua n-o de bulgara Esp-bulteno. C.MURGIN sekretario de BULGARA ES-ASOCIO.

## LA LASTAJ INFORMOJ PRI NIA TUTŜTATA

La konferenco okazos de 7-11.de julio 1955 en Kluba hotelo de Otrokovice proksime ĉe la urbo GOTTWALDOV.
KONFERENCKOTIZO estas 10.- Kčs, ĝin necesas sendi samtempe kun la Aliĝilo al la Organiza komitato: K-dino.Fany MATUŠOVÁ, Krátká č.812, OTROKOVICE (Morava)
Loĝado: estas al dispono litoj en hotelo po 15.-Kč tage/antaŭpagendaj 30.-Kč kaj litoj en komuna trankoktejo po tage 6.-Kč (necesas antaŭpagi 20.-Kč). Tiuj antaŭpagoj estu sendotaj al la supre menciita adreso kaj same ankaŭ ĉiu korespondaĵo, kiu rilatas la TUTŜTATAN.
PLILONGIGO DE LA ALIĜTERMINO: La organiza komitato decidis, por ke nia TUTŜTATA fariĝu vere unika amaskunveno de esp-istaj pacamikoj, plilongigi la aliĝterminon ĝis la 25.de junio. Ti-kiuj ne aliĝos ĝis tiu dato ne povas ricevi 50% fervojrabaton nek eblas garantii al ili loĝeblecon.
GASTIGADO DE EKSTERL.GEK-DOJ: Niaj eksterl.gek-doj certe oferos multe pli grandan monsumon o lvi, kiam ili venos al nia TUTŜTATA. Pro tio ni decidis, doni al ĉiuj senpagan gastigadon, kiuj mem ne havos sufiĉan monon. Por tiu celo ni aranĝis fonduson, kiun prizorgas k-do.K.KRAFT, Županovice, pošta HŘÍMĚŽDICE u Dobříše. Ĉiuj niaj legantoj, kiuj mem ne kapablas gastigi eksterlandan k-don-inon en Otrokovice, kaj precipe tiuj, kiuj tute ne povos partopreni, havas la eblecon donaci por tiu celo kelkan monon (k-do.Kraft akceptas eĉ la plej etan sumon kun dankemo) per kiu ni pagos la manĝon kaj. Tiuj donacojn ni konfirmos en la sekvontaj n-oj de nia bulteno. Čsl.gek-doj, kiuj mem povos gastigi eksterlandanon anoncu tion al k-do.Kraft. Al tiu ĉi adreso aliĝu ankaŭ eksterland. Gek-doj. kiuj bezonos senpagan gastigadon dum nia TUTŜTATA.
50% FERVOJRABATO jam estas certigita. Tio kondiĉas, ke nepre ĉiu interesulo aliĝu tuj sian partoprenon al k-dino.F.MATUŠOVÁ, por ke ŝi povu mendi la rabatkartojn. Kiun ankoraŭ ne ricevis ALIĜILON, petu ĝin ankaŭ de ŝi.
GASTIGADO DŮM LA SPARTAKIADO:
Esp-istoj en Praha, kiuj hava eblecon gastigi dum 2-3 tagoj eksterl.k-don-inon vizitontan la Spartakiadon, aŭ doni tranoktejon, bonvolu tion tuj sciigi al k-do. J.ŠUSTR, Dlouhá č.10,PRAHA I. Same la eksterlandaj gek-doj. kiuj vizitos la Spartakiadon kaj deziras loĝi ĉe esp-istoj en Praha, tion sciigu al la nomita kamarado senprokraste. La Esperanto-Klubo en Praha aranĝos bonvenigon de ekstrl. gek-doj en la stacidomo kaj apartan klubvesperon, se kelkaj alvenos.
„VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY", artista kolektivo de Esperantista Klubo en Praha, prezentos al vi en la kadro de nia TUTŜTATA interesan tutvesperan programon dum Kultprura Vespero.
Junulara grupo el Opava per recitaĵoj kaj horkantoj, same kiel aliaj grupoj vin amuzos dům la interkontiga vespero.
FILMOJ ktp.: la jam laste menciita filmo „HIROŜIMA" atingis ČSR-on. Dank` al k-do.Mijamoto Masao, kiu la aferon afable prizorgis ni krom tio ricevis ankoraŭ filmon „INFANOJ DE L`ATOMBOMBO". Certe ambaŭ filmoj vekos profundan impreson ĉe ĉiuj partopranantoj.
FAK-KUNVENOJ: Anoncon de ĉiuj fak-kuvenoj vi rigardu sur informa tabulo, kiu troviĝos en la konferencejo.

K-do.Márton Lájos, estro de SEAT anoncis sian partoprenon kaj intencas prelegi al sindikatanoj. Kunveno de ĉiuj religianoj: pastro, kanoniko Alfred MACEK, kiu kredas, ke ekzistas nur unu Dio kaj unu Paco, pretiĝas gvidi kunvenon al kiu estas invitataj anoj de ĉiuj religioj. Aparta Tutŝtata kunveno de Junularo estos de k-do.Kuzník el Opava. Speciale por studentoj preleg-k-do.Werner.
SOVJETA DELEGITO: Laŭ instigo de k-do F.Bokarev, sekr.de Lingvoscienca Instituto en Moskvo, ni sendis petskribon al la Scienca Akademio, ke ĝi delegu lin kiel observanton al nia TUTŜTATA en Otrokovice. Resp. Ni ankoraŭ atendas.

KIEL, HAVIGI ĈEĤOSL.MONON?
Eksterlandaj gek-doj. kiuj vizitos nin kaj ne ricevos sufiĉajn devisojn, povas jam de nun sendi al nia redakcio diversan progresemam literaturon, kiun al vendos kaj konservos la akiritan monon al ilia dispono.
POR NIA TUTŜTATA ALIĜIS ĝis la 30.de majo jenaj gek-doj:
K.Škrobák-Ostrava, A.Šrámek-Ostrava, A.Herold-Ostrava, L.Jonášová-Ústí n.L., prof.J.Kožený-Kutná Hora, J.Faltýnková-Val.Meziříčí, Fr.Lička-Ostrava, J.Velký-Ostrava, L.Matura-Pustá Polom, L.Magera-Mar.Hory, Jan Šamko-Ostrava, Vl.Slaný-Ostrava, J.Mlýnek-Ostrava, S.Martinkevičová-Ostrava, Vl.Valach-Trnava, B.Munzar-Hořice, M.Závodský-Žilina, M.Zýková-Plzeň, B.Zýka-Plzeň, Václav Hutter-Spál.Poříčí, Knut Hansen-Danlando, J.Hadámek, lernejdirektoro-Jakartovice, E.Hanáčková-Oldřichovice, L.Chytil-Lověšovice, M.Chytilová-Lověšovice, G.Menšík-Plasy, d-ro.Stanislav Kamarýt-Chotěboř, E.Munzarová-Hořice, Fr.Svačina-Lanžhot, Dušan Kostolný-Prakovce, ing.Vl.Chobola-Kunčice, J.Karhan-Olomouc, Vlad.Novobilský-Ústí n.L., A.Matyášová-Opava, A.Frantl-Opava, Fr.Štencrová-Opava, J.Werner-Brno, Vl.Šulc-Chrudim, M.Rudolf-Olomouc, A.Rudolfová-Olomouc, I.Severa-Praha, V.Kaplánek-Mar.Lázně, V.Špůr-Doksy, M.Sedláková-Třebíč, A.Šulcová-Chrudim, Št.Šumavanská-Praha, A.Rýznarová-Čtyřicet Lánů, St.Chaloupka-Batelov, J.Chaloupková-Batelov, Vl.Novotný-Praha, C.Fišer-Popůvky u Brna, B.Racková-Plešnice, B.Reitšpís-Plzeň, J.Pech-Plzeň, K.Kvist-Svedio, Rosa Wiendl-Svedio, Helga Wiendl-Svedio, d-ro.Vl.Mohapl-Olomouc, ing.Zd.Glajcar-Polio, Eli Urbanová-Praha, J.Zemek-Nymburk, A.Odehnal-Karviná, Fr.Kubásek-Karviná.
Akcepto en Otrokovice:
En la stacidomo funkcios gek-doj. ĉe alveno de ĉiu vagonaro jam de 6.julio de matenoĝis la 7a julio matene. Ĉe ili vi enketu event.informojn. La ĉefa informicejo troviĝos en la konferenca hotelo.

LA VARSOVIA FESTVALO NUR POR ČSM.

Sufiĉe multaj gejunulo el vicoj de ĉeĥoslov.esp-pacdefendantoj serioze klopodas ricevi veturpermeson por la Festivalo de junularo kaj studentoj en Varsovio. Kun petskriboj ili turnas sin al ČSM. (Ligo de Ĉeĥosl.Junularo) en Praha.

Ankaŭ k-do.M.Kulíšek el Plzeň petis esti envicigita inter la de legitaro kaj menciis aranĝon de esp-ista renkontiĝo kaj alvokon de la varsovia Festival-Komitato por kunlaboro, eĉ li menciis kiel UNESKO taksas Esp-on kaj ke la Lomonosov-Universitato en Moskvo ree instruas ĝin.

Stranga estis lia konfuzo, kiam li ricevis de la Junularligo (ČSM) jenan respondon de 8.junio:
CENTRA KOMITATO DE ĈEĤOSL. JUNULARA LIGO en Praha.

Estimata kamarado!
Al Via letero pri eblico de partopreno la 5.Mondan Festivalon por paco kaj amikeco en Varsovio 1955 mi komunikas al vi jenon:

La ĉeĥoslovaka delegitaro por la Varsovia Festivalo konsistas el delegitoj de ČSM (Junularligo), ĝiaj kulturaj kaj sportaj fakoj. La tuta delegacio estas jam kompleta kaj ties delegitoj aprobitaj en junular-kunvenoj. Ni komprenas kaj aprobas Vian klopodon kiel eble plej kontribui al la afero de paco, per disvolvo de kunlaboro inter junaj homoj de diveraj landoj, sed ni ne povas plenumi vian peton pro la supre cititaj kaŭzoj.
Kun saluto Vladimír Marek
sekretario de la festival-komitato ĉe la Ĉeĥosl.Junular-Ligo
Rim.de red.: Stranga sinteno de la Centra sekretario de „ČSM". Certe preskaŭ du monatoj estas sufiĉe da tempo por ankoraŭ envicigi kelkajn gejunulojn el aliaj organizoj, ekz.esp-istojn. Sed klare ĉi tie vidiĝas, ke mankas la bona volo al respondecaj funkciuloj. Ni jam atentigis la Varsovian Festivalkomitaton pri tiu situacio, kiu ne harmonias kun ĝiaj deidoj. Nun niaj esp-istaj gek-doj en Varsovia jam ne bezonas timi pri ev.fiasko, ĉar ĉi supre ili havas frapantan argumenton, ke ne ni, la esperantistoj kulpos pri event. malsukceso, sed la Junularligoj kiuj ne obeas la dezirojn de la Varsovia Festival-Komitato.

# N I A  M O V A D O  Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O

BYSTŘICE pod Host. La 15/5. okazis reg.konferenco de la regionoj Ostrava kaj Olomouc. Partoprenis 56 delegitoj el 20 urboj. La konferenco ankaŭ pritraktis diversajn aferojn  rilate nian TUTŜTATAN.
KOPŘIVNICE, anstataŭ k-dino.Marta Hrčková transprenis la distribuadon de nia cirkulero „L.P.“ k-do. Zdeněk FIGAR, KOPŘIVNICE n-o. 761/6, Morava. Ĉiujn plendojn rilate malfruiĝon aŭ nericevon de L.P. sendu unue al lia adreso. El la rondeto klopodas 5 k-doj partopreni la Varsovian Festivalon de Junularo.
OSTRAVA, en la nomo de la klubo ni sendis salutleteron al la Junular-Festivalo en Varsovion, al Germana Packongreso en Dresden kaj krome k-do.Fr.Lička sendis salutleteron kaj abundan Esp-materialon al la sovjeta lingvoscienculo, k-do. A.E.Bokarev en Moskvo.
PLZEŇ, la rondeto decidis elsendi kiel oficialan delegiton por nia TUTŠTATA, 71 jaran Esp-pioniron, k-don Josef PECH, kiu lumbildprelegos pri siaj peresperantaj vojaĝoj tra la mondo en aparta seminario. Nia rondeto kunvenas ĉiu merkrede 19a horo en restoracio „U Fišerů“, str.Sedláčkova 39. Regule partoprenas ĉ.20 gek-doj. Merkrede la 29an de junio parolos en la klubo k-dino Marcelle ROBINEAU el Parizo, k-do.G.HOLMKVIST kaj K.KVIST el Svedio. Eble ankroaŭ pluaj gek-doj, kiuj veturas al la TUTŜTATA tra Plzeň, vizitos nin. Ĉiuj ge-doj el Plzeň kaj ĉirkaŭaĵo amase alvenu la 29/6 je la 19a horo.
HULÍN, pro diveseco de laborter-minoj la vivo de nia rondeto iom stangas, sed bonan propagandon faras nia murkesto en uzino kiu estas dufoje en la monato rearanĝata. Kun intereso la okupitoj rigardas la ekspozicion. Sur galerio ni instalis la „Migrantan Ekspozicion de Esp-Pac-defendantoj“, kium multaj fremdaj vizitantoj, kiuj ekskursas al nia uzino kun intereso studas.
MARTIN, nia rondeto kunvenadas regule ĉiu ĵaŭde de 16a horo en klubejo de Osvětový dům, Stalinovo náměstí. Vizitu nin okaze de traveturo. Gastoj estas kore invititaj.
OPAVA, en nia rondeto 5 gek-doj serioze klopodas veturi al la Festivalo Varsovion. Por nia TUTŠTATA nia grupo ekzercas kanthoron laŭ instigo de k-do.Novobilský. K-do.A.FRANTL preparas interesan prelegon por niaj eksterlandaj gastoj. La TUTŜTATAN vizitos 15 gek-doj.
MÍSTEK, la gazeto de nia uzino „SLEZAN-Textilák“ publikis laŭ instingo de nia k-dino Bartovská la konkretan rezolucion pri Esperanto, eldonitan de UNESKO.
OLOMOUC, en la kadro de la sindikata sekcio por kulturo en nia Popola Juĝejo fondiĝis Esp-rondeto, kiu komencis la 4an majo kurson kun 7 lernantoj. Instruas k-do.M.Rudolf.
LIBEREC, la rondeto nun kunvenas ĉiu marde en la Kultura Domo. Ĉiam okazas interesaj prelegoj. De 26/6. ĝis 7/9. ni ferias. Dum tiu tempo niaj anoj partoprenos la TUTŜTATAN kaj Someran Esperanto Kolegion en Doksy.

AL NOVA GEEDZA PARO

gek-doj. ZEDNÍK Milán kaj Sonja el PRAHA-Modřany, ni deziras multan feliĉon en ilia komuna vivo kaj ankaŭ komunan aktivecon en nia movado.

NI KONDOLECAS

La 23an de majo post grava malsano mortis la kara edzino Anna de nia aktiva k-do.Rud.HROMADA en Praha. Li kaj ĉiuj postrestintoj akcepu nian profundan elkondolecon.

NI RECENZAS

aperis nova progresema Esp-revŭo „NORDA PRISMO“ eldonata dumonate en Stockholmo. Redaktas k-do.Fer.SZYLÁGYI. La marta-aprila eldono konsistas el 64 bele presitaj paĝoj kun interesaj artikoloj kaj ilustraĵoj. Mendebla ĉe: F.SZYLÁGYI, Mariedalsgatan 9, BORAS, Svedio.

S O M E R A  E S P E R A N T O  K O L E G I O  E N  D O K S Y

Al tiu ĉi n-o. ni aldonas prospekton kun aliĝilo por la Esperanto – kursoj en Doksy, kiun ni varme rekomendas. Bonvolu korektigi sur tiu prospekto al aliĝterminon: Aliĝojn oni akceptas ĝis la 30a de junio ne ĝis la 20a, kiel estas erare presite sur la prospektoj.

K O R E S P O N D I   D E Z I R A Szemyslu Odziezo

K-do.F.KOLLÁR János, Körös u.7or. PÁCD-MESZESTELEP, Hungario, (14j) kun ĉ.landoj kaj interŝ.p.m.
K-do. Jiří SVOBODA, Mošnova  č. 26, per il.p.k. kaj leteroj filat.afrinkitaj kun ĉ.landoj. Certe respondas.
KLUBO I.L.CARAGIALE, MEDIAS, Rumanio, dez.interŝ.notojn de facila muziko (tango, kanzenojn, ktp. ĉefe packantojn). Por pruvi ke Esperanto valoras, sendu amase!
K-do.Krasimír ANGELOT, Kl.Ohridski 7, BOURGAS, Bulgario, interŝ.p.m.kaj fotojn. Koresp.ruse,germ. kaj france (komencanto).
JUNULARA GRUPO DE PACDEFENDANTOJ dez.koresp. kun gejunuloj kaj grupoj, kiuj intencas viziti la Junular-Festivalon en Varsovio. Adreso: Zarza Zakladowy Z.M.P. przy Zakladach Przemyslu Odziezowego im.“Obrancow Pokoju“, Ul.15-go Grudnia 17-21, GLUCHOLAZY, POW.Nysa, Polio. Skribu multnombre.
K-do.Vittorio CANDOTTI, Zompicchia, UDINE, Italio, kun sovetaj kaj ĉinaj gek-doj. Certe resp.
K-do.P.J.ESSI, Str.Kizsi 27, TALLIN-PJASKULA, Sovjet Unio, *ESSR* precipe kun Popoldemokratioj.
K-do.Fedotov Johan Platonoviĉ, Str.Vokzalnaja 134 kv.I, KUJBIŜEV Sovjet-Unio-USSR, kun ĉ.landoj.
K-do.vojín Pavel KILLIÁN, PS 12/U, Pardubice, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.
K-do.vojín Vladislav LAHODA, PS 12/U, PARDUBICE, pri motorismo interŝanĝas samtemajn gaz., prospektoj kaj il.p.k.
K-do.Mihály FARKAS, instruisto ORMOS BÁNYA, Hungario (25j.fraŭlo) kun eksterlandanoj, kiuj intencas kaj povus viziti Hungarion por renkontiĝo.
K.do.V.P.Pisarev, Čapajevskaja 100 kv.2, KUJBIŜEV, Sovjet-Unio-USSR, kun ĉiuj landoj.

---

GESAMIDEANOJ ĈIULANDAJ KUNLABORU ĉe preparo de popularscienca verko de granda signifo-Populara Enciklopedio! Montru la utilecon kaj taŭgecon de Esperanto kiel perantoj de kulturaj valoroj! La kunlaboro koncernas diversajn fakojn, ĉiu inteligenta homo povas kunlabori en fako, kiun li preferas. Postulu detalojn de s-ano.E.TVAROŽEK, Hviezdoslavova 2, MARTIN, Ĉeĥoslovakio.

---

K-do.Steve BENNETT, Brighton Av.2, CROYDON PARK, N.S.W.Aŭstralio, malesperas pro image malfavora Esp-situacion en Sovjetio kaj Ĉinio. Sovjetaj kaj ĉinaj gek-doj. via devo estas konsoli lin.

## M U N I C I O   P O R   N I A   B A T A L O

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| K.do.V.Jindřich-Karl.Vary | 8,- Kčs | | K.do.Cor de WAART-Plzeň | 5,- Kčs |
| K.do.J.Daroň-Kunčice | 3,- Kčs | | K.do.J.Mazurek-Uh.Hradiště | 3,- Kčs |
| K.do.J.Pátek-Holešov | 3,- Kčs | | K.do.J.Svoboda-Děčín | 7,- Kčs |
| K.do.Fr.Černý- Černovice | 8,- Kčs | | K.do.A.Kopecký-Paseky | 3,- Kčs |
| K.do.K.Kraft-Županovice | 6,- Kčs | | K.do.K.Svoboda-Mlýny | 5,- Kčs |
| K.do.K.Kvist-Svedio | 1 broŝuron | | K.do.M.Hanačík-Přerov | 2,- Kčs |
| K.do.L.Giloteaux-Francio | 5 broŝuron | | K.do.A.Odehnal-Karviná | 2,- Kčs |
| K.do.J.Hylák-Plzeň | 20,- Kčs | | K.do.J.Novák-Hronov | 8,- Kčs |
| K.do.d-ro.Nigra-Pleň | 5,- Kčs | | K.do.J.Kavka-Praha | 2,- Kčs |
| K.do.A.Lizna-Mor.Třebová | 5,- Kčs | | K-do.L.Rýznár-Svitavy | 2,- Kčs |
| K-dino.Šumavanská-Praha | 30,- Kčs | | K.do.C.Fišer-Brno-Popůvky | 2,- Kčs |

VIA MUNICIO EFIKE SERVAS – AKCEPTU NIAN KORAN DANKON!

<u>I n f o r m o</u>

La venonta n-o. de „L.P." aperos post la TUTŜTATA, t.e.fine de julio kiel duobla eldono por julio kaj aŭgusto. Ĉiujn raportojn, artikolojn kaj anonojn klopodu sendi ĝis la 20a julio al k-do.R.Burda.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx
ELDONI: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO TATRA, n.p. KOPŘIVNICE
REDAKTIS: K-do.Rudolf BURDA, Palackého nám.č.6, P L Z E Ň, ČSSR
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

<u>! ĝis la revido en Otrokovice !</u>




*VAŠE DOVOLENÁ U MÁCHOVA JEZERA*

L E T N Í K O L E J E S P E R A N T A

*DOKSY 17.-30.VII,1955*

*50% sleva na dráze*

Dopoledne k u r s y

Odpoledne r e k r e a c e

Večer z á b a v a

Příjezd v neděli 17.7.1955 – Odjezd v sobotu 30.7.1955
U b y t o v á n í obstará Kolej. S t r a v o v á n í si zajistí každý dle své volby v místních podnicích.

K U R S Y   E S P E R A N T A :

A - Z Á K L A D N Í (pro začátečníky) – vyučuje se přímou metodou.
B - P O K R A Č O V A C Í (gamatika, jednodušší konversace, četba, zpěv)
C - K O N V E R S A Č N Í (složitá konversace, řečnická cvičení, gramatické problémy, překlady, dějiny hnutí, literatura)

Velmi pravděpodobná účast zahraničních esperantistů-návštěvníků Spartakiády.
Podrobnější pokyny a slevenky na dráhu obdržíte včas několik dní před svým odjezdem. N e u r g u j t e !
PŘIHLÁŠKY ZAŠLETE DO 20.ČERVNA 1955 na adr.LETNÍ KOLEJ ESPERANTA D O K S Y u Máchova jezera.

KURSOVNÉ též současně pošt.pouk.na účet LKED č.2240 u St.spořitelny v Doksech (směr.znak: 0603 – 3 – SBČs Doksy č.237002)

NUTNÉ INFORMACE: Václav Špůr, Doksy u Mách.jez., telefon 393

---

P ř i h l á š k a - LKED          Kurs:
Jméno:          nar.:
povolání:

Adresa bydliště:
Nástupní stanice:
Přání-ubytování:
Platím kursovné vč. vstupného na podniky, k jezeru, odvozu zavazadel a ubytování: a/společného Kč 220,- b/ v soukromí Kč 259,- c/v hotelu Kč 298,- / nehodící se škrtněte /.

Dne:
Podpis: